## MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr (inkl. sendkoston), je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. Abono akceptata. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 int. respondkuponoj. Nroj 1/43 kaj 2, 3, 4/44 vendataj por po 0,55 kr. — Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝtokonto 26 80 23.

PREZO: 1:– Kr.

# MALGRANDA REVUO

N:RO 2 — 1946

4-a JARO

ENHAVO:


| | Paĝo |
|---|---|
| EL ĈIUJ POPOLOJ de Natan Alterman | 1 |
| EL LA NIGRA LIBRO de Dro A. Mildwurf | 3 |
| LETERO EL GERMANUJO | 8 |
| KANARIAJ INSULOJ de Juan Régulo Pérez | 10 |
| "ĜUSTA PERSONO EN ĜUSTA LOKO" de Einar Hult | 15 |
| LA DUALISMOJ De Mogens Munch | 19 |
| LA FAJROFESTO de Stellan Engholm | 26 |



*Redaktoro — Eldonanto:*
*STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO*

# MALGRANDA REVUO

N:ro 2 4:a JARO 1946


## El ĉiuj popoloj

De NATAN ALTERMAN

(Pri judaj infanoj en Oświecim, Majdanek kaj Treblanka.)

Dum marŝis infanoj al la eŝafod',
protest' ne leviĝis je ondo,
ne venis de l' monda indigno eksplod';
silentis, silentis la mondo!

Ho, Dio! El ĉiuj popoloj sur ter'
elektis Vi nin kaj preferis;
je gloro eterna de Via mister'
Vi nin — la amatojn oferis.

Vi niajn infanojn por buĉ' kaj tortur'
elektis el ĉiuj popoloj,
por mort' kaj turment', por martira terur',
el ĉeñoj, el angloj, el poloj...

Kaj sciis l' infanoj sur voj' de martir'
marŝinte en mortkaravanoj,
ke taksas ne alte la monda foir'
la sangon de judaj infanoj.

Kaj petis l' infanoj dum lasta minut':
"Nur nin ne rigardu, patrino!"
Daŭriĝis dum tagoj kaj nokt' l' ekzekut' —
postulo de rasa doktrino.

Kaj Sankta la Patro en ora sutan'
ne faris kun la diakonoj
protestprocesion tra l' urb' Vatikan'
kun krucoj, standardoj, ikonoj.

Neniu sin ĝenis, eĉ Papo en Rom',
neniu kontraŭis, protestis. —
Kun judaj infanoj dum buĉa pogrom'
neniu enkore kunestis . . .

Mond' zorgis pri art', de milita profan',
pri bild' kaj statu' ne forgesis;
sed arta kapet' de vivanta infan'
de judo — ĝi ne interesis!

Ho, saĝaj infanoj, kun pet' en okul'
pri lasta komplez', en humilo —
ke panjo ne vidu de ŝia etul'
sangfluon kaj morton de filo;

ke ŝi ne rimarku kadavrojn en vic',
por resti pri l' morto diskretaj:
"Ni estas soldatoj en serva ofic',
la samaj soldatoj, nur . . . etaj . . .

Ne ĝenu Vin, Dio, pri dev' de respond',
ni scias, ke Vi ne severis!
Ni scias: el ĉiuj infanoj de l' mond'
plej amis Vi NIN kaj preferis.

Do, nin Vi elektis por morto kaj buĉ',
kaj vidas Vi nin de la trono,
kaj Vi nian sangon kolektos per kruĉ',
ĝin meti en oran kaldronon.

Vi certe kolektos ĝin, Dio, ĉu jes? —
Ĉar kiu, krom Vi ĝin bezonas?
Flarados Vi ĝian odoron sen ĉes',
ja floroj pli bonan ne donas!



Anstataŭ parfum' Vi por tuk' el batist'
ĝin prenos po gut' odoranta . . .
Rememoriĝonte pri nia ekzist',
pri sang' nia, nun elfluanta,
VI ĜIN REPOSTULOS DE NIA BUĈIST',
DE L' TUTA HOMAR' SILENTANTA . . ."

El la hebrea de *J. Kohen-Cedek*, Jerusalem.

---

## El la Nigra Libro

*De Dro A. MILDWURF*

La plej terura de la terurajoj estas
la homo en sia vanteco.
Schiller.

Ĉiuj homoj estas fratoj — en la teorio, en la kredolibroj. Sed levu por momento la vualon de la realo: ĉu vi ne vidas, kiel la homoj diskarnigas kaj kontraŭbatalas sin reciproke? Kie estas amo, interkompreno, frataj kuniro kaj kunago? Per kia genia fantazio la homoj elpensas la plej kruelajn detrurimedojn!

Nigra libro de la homaro, malfermiĝu! Mi volas rerakonti unu el la plej teruraj ĉapitroj de la kulturhistorio. Kion la homoj ne inventis por ekspedi de vivo al morto krimulojn aŭ tiajn personojn, kiujn oni konsideris kiel krimulojn! Paĝoj de la nigra libro, viviĝu kaj rakontu!

La romanoj faligis krimulojn, kiuj meritis mortigon, de turoj kaj rokoj. Ŝtonumo estis kutima ĉe la judoj de la antikva tempo. Mortigado de homoj per soifo kaj malsato estis ordinara en Romo dum la imperiestro Tiberio. Ankoraŭ en la mezepoko oni ĵetis malfeliĉulojn, kiuj nenion malbonan faris, nur rezistis la rabadon, en malsatturojn, kie oni malrapide malsatigis ilin. Precipe pastrojn oni malsatigis, ĉar pro superstiĉo oni ne kuraĝis verŝi ilian sangon. Dum la roma imperio oni

ĵetis katenitajn krimulojn al rabobestoj por manĝo. Estis apenaŭ pli milda formo de ekzekuto, kiam oni permesis al ili sin defendi sen armiloj kontraŭ la bestoj, ĉar tio ofte nur plilongigis la ekzekuton.

Al rabpafistoj kaj ŝtelĉasistoj oni praktikis la teruran punon ligi ilin sur cervoj, kiujn oni lasis forkuri tra arbaroj, heĝoj kaj dornejoj, kie la malfeliĉuloj estis disŝirataj. Por liberiĝi de la nekutima ŝarĝo la cervo rulis sin en marĉoj kaj sur tero, mejlojn kuris rapidege, ĝis finiĝis la vivo kaj de la besto kaj de ĝia ŝarĝo.

Ĝis la 19a jarcento restis la terura ekzekutmetodo de ensaka dronigo, kiun oni uzis precipe por sorĉistinoj kaj virinoj mortigintaj infanojn. Oni enkudris la kondamnitojn en sakojn — ofte kun hundoj, katoj aŭ ratoj, eĉ kun simioj — kaj ĵetis ilin en akvon. Sed dronigpuno estis farata ankaŭ sen ensakigo. En 1435 la bela Agnes Bernauer estis ĵetata en Danubon, kaj kiam ŝi naĝante venis al la bordo, la ekzekutisto per longa stango forigis ŝin, ĝis ŝi malaperis. Ankaŭ la sankta Nepomuk estis ĵetata en Moldavon en la jaro 1392, laŭ ordono de la sangavida reĝo Venceslao en Praha.

Bruligpuno restis de la antikva tempo ĝis la 19a jarcento. Famaj estis la torĉoj de Nero, la amasbruligo de herezuloj en Hispanujo kaj brulmortigo de sorĉistinoj. Ofte oni enkudris la kondamnitojn en bovhaŭtojn, foje oni pliakrigis la punon malrapide karbigante ilin, forbruligante unue la plandojn kaj poste iom post iom la tutan korpon. Tiel estis brulmortigata en Moskvo 1689 la frenezа religia fanatikulo kaj "Princo de Dio", Quirinus Kühlmann. De Plutarko estas menciita speciale kruela ekzekutmaniero, kiu montras vere frenezan turmentemon. Oni trempis krimulon en mielon kaj en bruliga sunbrilo lasis lin al la muŝoj, kiuj mortturmentis lin. Ankoraŭ en la nova tempo okazis tia kruela mortturmento en Kolonjo, kie grafo Berg estis mortigata tiamaniere.

La antikvaj germanoj lasis ĉevalojn pieddispremi certajn krimulojn. Monfalsistojn oni bolis en kaldronoj kun oleo kaj vino. En la punsistemo de la juĝejordo de Karlo V troviĝis la pliakraj mortigmanieroj de pikmortigo per palisoj, rado, dronigo saka aŭ sensaka. Kurioza ekzekutmaniero estis jena: oni



senvestigis la krimulon kaj sur libera kampo enterigis lin ĝis la kolo. Poste oni jungis al plugiloj kvar ĉevalojn, kiuj nenion sciis pri plugado, kaj pelis ilin al la kapo de la enterigito, ĝis la plugila fero ĝin forŝiris. Terure kruela puno estis rimentranĉado el dorso kaj aliaj korpopartoj. Tia puno okazis 1589 al patrinmortiginto en Praha.

Kiel plej humanecan mortigmanieron oni konsideris jam en la antikva tempo senkapigon. Grekoj kaj romanoj konis ĝin. Ankaŭ en la nova tempo, kiam oni uzis la plej kruelajn mortigmanierojn, ĝi estis ĉiam uzata por nobeloj. Konradino, Frederiko el Aŭstrio, Petro de Kastilio, la edzinoj de Henriko VIII, Maria Ŝtuart, Karlo I, Ludoviko XVI, Marie Antoinette kaj multaj aliaj kronitoj suferis tian ekzekuton, kiu, se ni pensas pri la amaslaboro de la gilotinoj dum la franca revolucio, ankaŭ povas esti terure kruela.

Unu el la plej teruraj ekzekutaj kruelaĵoj okazis la 28an de marto 1757 al Damiens, kiu faris atencon kontraŭ la vivo de la reĝo Ludoviko XV. La haroj hirtiĝas, kiam oni imagas la fiaĵojn, kiujn oni elpensis kaj faris kontraŭ li. En la nokto antaŭ la ekzekuto oni torturis lin en terura maniero kaj poste tiris lin al la Grève-placo, kie oni donis al li du glasojn da vino por denove firmigi lin por la ekzekuto. Poste oni trapikis lian dekstran manon per la sama spado, kiun li levis kontraŭ Ludoviko. Post tio oni sur ardanta forno rostis la manon, ĝis ĝi fariĝis stumpo. Tion farinte oni per fero fiksis la malfeliĉulon al la planko kaj per ardantaj preniloj elŝiris karnon el diversaj korpopartoj. Samtempe aliaj ekzekutservistoj verŝis en la vundojn fanditan plumbon, varmegan oleon, vakson kaj sulfuron. Plie oni ligis kelkajn junajn ĉevalojn al la brakoj kaj piedoj de la turmentato por disŝiri lin. Tio ne sukcesis, kaj eĉ post duobligo de la nombro de ĉevaloj kaj post trikvaronhora laboro ĝi ne sukcesis. Tiam oni distranĉis liajn tendenojn kaj tiamaniere helpis. Fine oni ĵetis la restaĵojn sur brulŝtiparon.

En la 20a jarcento la nacisocialista Germanujo kreis terorsistemon apud kiu paliĝas eĉ la inkvizicio. Koncerne socian kaj individuan liberon Germanujo troviĝis en la Malluma epoko. La germana popolo vivis laŭ leĝoj de sovaĝuloj. Per perforto, furioza detruo, kruelo, persekuto kaj subpremo — en tiel gran-

da skalo sen komparo en la historio — Germanujo reiris al regado de ĝangalo. La plej primitivaj kaj sangavidaj instinktoj de la homoj fariĝis leĝo de la lando. La liberdetruo de la germana popolo, en privata kaj profesia vivo, faris el Germanujo lokon por fanatikuloj, kiuj emis senmoraligi la homaron. Multaj libroj estas skribitaj pri la vivo en koncentrejoj, pri likvidado de judoj, pri senkompata persekuto kontraŭ ĉiu, kiu ne tutkore simpatiis kun Hitler. La homa memoro estas tamen mallonga. Ŝajne ni lernis akcepti ne nur la malbelegan bombardon al civiluloj kaj la modernan murdomilitadon sed ankaŭ la amaran kaj senkredan oferbuĉadon de senkulpaj homoj en la ŝaŭmanta malamkaldrono de Germanujo.

La hitleristoj konscie, intence forstrekis tiun limlinion, kiu dividas la homan mondon de tiu de la bestoj... Germanujo liberiĝis de ĉiuj konsciencaj skrupuloj, de ĉiu sento de honto kaj moralo, de ĉio propreca de kulturitaj homoj. La mondo vidis armeon de kanibaloj, ŝtaton de kanibaloj, sciencon de kanibaloj. Ili murdis milionojn kaj bruligis la malfeliĉulojn en la gasĉambroj de la kampejoj de degrado kaj morto.

La piedojn de tute senkulpaj homoj oni brute batis per bastono plena de rustaj najloj. La piedoj ŝvelis, infekto de gangrena naturo estiĝis, kaj nur kelkaj homoj saviĝis de amputo. Komuna sperto de la malliberuloj estis, ke oni ĵetis brulantajn cigaredojn en la gorĝon. Aliajn loĝantojn de la koncentrejoj oni devigis genui kaj malfermi la buŝon, dum la gardistoj urinis en ĝin. Alia ĉiutaga sperto estis batado per kaŭĉukaj bastonegoj, plumbaj tuboj kaj tuberaj lignobastonoj sur kapon kaj korpon, kelkfoje ĝis la karno fendiĝis ĝis la ostoj. La nacisocialistoj kuracis la viktimojn verŝante botelojn da jodo en la krudajn, nefermitajn vundojn. Kelkajn homojn oni vekis ĉiun dekan minuton nokte, devigis iIin atente stari, dum gardistoj briligis lumon en iliajn vizaĝojn, ŝajnigante inspektodevon. Fine ili fariĝis nervozaj, fizikaj ruinajoj, nepovantaj dormi nokte kaj tage pelataj al malfacila laboro. Iam la gardistoj, kutime elektitaj el SS pro nekompato, lojaleco al la partio kaj evoluinta sadismo, desegnis lokon sur la planko de la karcero kaj devigis la homojn stari senmove dum du aŭ tri tagoj. Je la fino de tiu tempo la piedoj kaj la kruroj estis tiom ŝve-



lintaj, ke ili povis nek senti nek iri. Se ili moviĝis de sia loko, oni senkompate batis ilin.

Al la pli multaj el la viroj kaj virinoj oni donis la taskon purigi necesejojn per nudaj manoj, kaj oni diris al ili, kiam ili volis purigi la manojn, ke ili devas leki ilin. Ĉiutage okazis sennombraj aliaj spertoj aŭ tro teruraj aŭ tro naŭzaj por rakonti. Ordinaraj krimuloj ne trapasis tiajn severajn provojn — estis la tiel nomataj politikaj malliberuloj, kiuj devis tion suferi pro venĝo kaj sadista perverso de homoj.

Homojn de ĉiuj rasoj, religioj kaj kredoj oni torturis, ĝis ili ne plu estis rekoneblaj kiel homaj estaĵoj. Viroj kaj virinoj estis ĝismorte batataj, pafataj kiam ili provis forkuri, devigataj memmortigi sin, estis viktimoj de tiom sagace elpensita torturo, ke oni apenaŭ povas kredi ĝin vera. Seksaj krimoj de plej malbelega speco estis en la tagordo de la koncentrejoj. La plej malindaj, plej sadistaj kaj detruaj instinktoj de la homoj estis glorataj tra la lando, kiu per la veno de Hitler perdis sian rajton esti membro de civilizita raso. Mi supozas, ke nur inter la plej sovaĝaj triboj de plej senluma primitiva vivo kaj en la plej malbonaj jaroj de la inkvizicio sub Torquemado oni povas trovi ion kompareblan al la teroro de Hitler.

Memkompreneble estas terure konstati, ke malamo kaj detruemo estas instinktoj, kiuj kuŝas profunde en la homa naturo — sed amo, idealismo kaj konstruemo estas same profundaj kaj fortaj. Hitler devas en la historio preni la respondecon pro sia atenco malnobligi grandan parton de la homaro kaj pro ĝia degrado al nura primitiveco kaj barbareco — deklarante noblaj, je teruro por la cetera homaro, la plej furiozajn instinktojn de la homoj.

Silentu, teruraj paĝoj el la nigra libro! Kiu povas nomi ĉiujn terurajojn, kiuj okazis sub protekto de leĝoj? Ĉu la homo en sia vanteco ne estas la plej terura el ĉiuj terurajoj?

# Letero el Germanujo

El letero de niaj samideanoj gesinjoroj Oscar kaj Elizabeth Bünemann en Hamburgo mi ĉerpas la subajn liniojn, kiuj certe havas ĝeneralan intereson por alilandaj esperantistoj. La dato estas 27.4.1946.

S. E.

— Ni intencis skribi al vi tuj post ekfunkcio de eksterlanda poŝta trafiko: oni tamen ĉiam iom hezitas, ĉar oni ne scias, kiel oni en aliaj landoj akceptos poŝton el Germanujo.

Por poŝto el Germanujo al eksterlando estas permesitaj nur la lingvoj angla, franca, germana kaj rusa. Sed por leteroj el eksterlando al Germanujo estas permesita ankaŭ esperanto. La esperanta asocio en Hamburgo faris peton, ke oni permesu ankaŭ esperanton por germanoj. La germanoj ja estu edukotaj al konscio pri kunligo kun ĉiuj popoloj, kaj kio estas pli bona rimedo por tio ol esperanto?

Por ni estis terure malfacilaj jaroj, kaj verdire ne nur la militjaroj sed antaŭ ĉio la jaroj post 1933, kiam la nacisocialistoj "okupis" Germanujon — ĉar alie ni neniam rigardis tion: estis kvazaŭ fremda potenco estus nin okupinta.

Kaj nun ni staras antaŭ materia kaj spirita rubamaso. Kompreneble ni tre malgrasiĝis. Ni devas zorge administri niajn forton kaj energion. La vintro estis turmenta, ĉar karbo kaj ligno ne ekzistis. Sed nun ni ĝojas pro la printempo. Ni volas ĉion fari por travivi tiun ĉi tempon de nutrajmanko, kaj ĉio estus ja pli facile eltenebla, se ni ne havus antaŭ ni tiun gigantan taskon: reeduki la germanan popolon. Ni havos estonte kiel antaŭe malfacilan situacion rilate al la granda amaso, kiu tro miope prijuĝas — aŭ pli bone: tute ne havas prijuĝon. Kie ni iel povas agi en tiu direkto, ni tion faras, laŭ permeso de niaj fortoj. Nian esperantan agadon ni povis rekomenci. La angla milita aŭtoritato donis sian aprobon. Krome ni laboras en la Germana Pacosocieto, en la Internacia virina ligo por paco kaj libero kaj en la socialdemokrata partio. Vi vidas, ke ni do efektive estas tro okupitaj kaj pro la nuna nutrajo verdire devus iom reteni nin. Sed ĉar ni spirite vegetis de 1933, ni tre ĝuas tiun agadon. Kompreneble ĉie mankas libroj kaj presmaterialo. Ni devas ankoraŭ havi multe da pacienco.

La amaso de la popolo ankoraŭ ne komprenas, kiom ni malsupreniĝis ekonomie kaj spirite: tio klariĝas al unuopuloj nur iom post iom, kaj multaj estas tiel stultaj, ke ili kulpigas la aliancajn pro la tuta nuna mizero. Estas nekredeble, kiom stultajn eldirojn oni aŭdas atendante ekster la nutrajbutikoj. Malantaŭ tiuj opinioj de la amaso troviĝas kompreneble alflustrado de la nacisocialistoj, kiuj ankoraŭ tute ne estas ĉesigitaj. Ni deziras — kvankam ni kompreneble prefere estus sen fremdaj vartistoj — sufiĉe longedaŭran britan okupadon; ĉar nur ĝi povas savi nin de rabo kaj murdo kaj de reviviĝo de militarismo kaj naciismo.

Nia esperantosocieto, Hamburga esperantosocieto, tute decide kaj emfaze staras sur la grundo de popola interkompreniĝo, tia, kian ja ankaŭ Zamenhof sopiris. Mi tiom deziras, ke UEA en Ĝenevo kaj IEL en Londono unuiĝu kaj en ia labordivido komune laboru por esperantismo kaj praktikaj celoj. Dro Privat estis ja antaŭ kelkaj monatoj en Londono; espereble signifas tio, ke li komencis labori por tia kuniĝo kaj ankaŭ trovis renkontemon.

Vian tradukon de "La Fino" mi jam antaŭ longe glutis; tio estis por ni sensacio. En la esperantovesperoj ni uzas ĝin kiel ekzercan tekston. Mia edzino legas ĉiufoje parton el ĝi, kaj *ĉiuj* eksterordinare interesiĝas pri ĝi. Mi ricevis la libron de brita samideano kontraŭ io el mia libroŝranko; cetere ĝi tute ne estas havebla. Nia mono estas ja tute senvalora ekster la lando*.

Vi pravas; kiel esperantistoj ni apartenas al la sama familio, kaj estas tre rekoninde, ke vi per tia eldiro apartigas nin el la amaso de naciistigitaj germanoj; sen troigo mi kuraĝas

* Esperantaj libroj, revuoj kaj gazetoj certe estas tre bonvenaj por la germanaj samideanoj. La adreso de sro Bünemann estas: Oscar Bünemann, Isestrasse 79 III, (24) Hamburg, British Zone, Germanujo. Presajoj tamen ankoraŭ ne sendeblaj.

diri, ke ĉi tieaj esperantistoj vere ne apartenas al tiu naciistigita amaso.

Kiel vi vidas, ni ankoraŭ ne tute trovis trankvilon. Sed ni tamen esperas pri pli bona estonto kaj antaŭ ĉio pri pli bona kompreno inter la popoloj; antaŭ ĉio UNO kontribuu por sekurigi pacon — tiuokaze ni povos altiri al ni ankaŭ tiujn germanojn, kiuj nun restas flanke, en hezito kaj atendo.

Salutu ĉiujn amikojn, kiujn ni konas; ili sciu, ke ni restas la samaj kiel antaŭe. Ni ne bezonis ŝanĝi vivkonceptojn; ili estis firmaj jam antaŭ la unua mondmilito.

---

## Kanariaj Insuloj

De *JUAN RÉGULO PÉREZ*

Kanariaj Insuloj, navigantaj sur fantazia fabelmaro, freŝaere ventumataj, ĉiellazure plafonitaj kaj enhavantaj grandiozan, mirravan vegetaĵaron; tiuj insuloj kronataj de altegaj montopintoj, plenplenaj de raraj pejzaĝoj, kun gigantaj krateroj kaj mondfamaj valoj, estis, jam de antikvaj tempoj, prestiĝe nimbataj de poetoj, historiistoj kaj marveturantoj.

Nuntempe iliaj loĝantoj ne estas tiel feliĉaj kiel dum la pratempa mitepoko. En la nuna ero, la insuloj jam ne estas plu ĉe la misteralloga mondofino. Sed ĉar iliaj prestiĝo kaj nimbo estas ankoraŭ retorika figuro, jen, je ĝentila invito de samideano Engholm, kvar bildoj pri la Kanaria Arĥipelago.

### I. MITO.

Ekde la praaj tempoj, la homoj sopiris je mondo pli feliĉa ol tiu ĉi mizera, kie oni vivas. Dudek jarcentoj de kristanismo instruis, ke tiu mondo estas akirebla nur en la postmorta ekzisto. Sed homo de la antaŭkristana tempo kredis, ke ĝi estas surtera, sed ege, ege malproksima, en iuj insuloj tre okcidente, ĉe la mondofino, ie nedifinite trans la heraklaj kolonoj.

Jam la *Odiseo* parolas pri la Elizeo, lando kie loĝas la herooj, en eterna printempo, post la morto. Sed estas Hesiodos, kiu



unua alnomis ĝin per la bela esprimo de B e a t u l a j  I n s u l o j. Tiuj insuloj fabele navigadis okcidenten, ĉiam okcidenten. Kaj Pythéas, jam dum la kvara jarcento antaŭ Kristo, ĉarme priskribis paradizan oceanan landon, kiun li vizitis. De tiu epoko, sur tiu kadro de realo, oni ornamis la okcidentajn insulojn oceanajn per la elizeaj rakontoj eposaj. Kaj dum la militaj periodoj, la menso de la homoj sopiris pri la feliĉaj insuloj. Tiel sin esprimis Píndaros unue, Pláton poste, en Hellenujo; kaj en la roma mondo ili estis por Plautus *Insulae Fortunatorum*, por Sallustius *Insulae Fortunatae* t. e. "Feliĉaj Insuloj", kaj poete *arva beata* por Horatius.

Fakte, en la malproksima okcidento, estas certaj insuloj, kiuj respondas al la priskriboj de la poetoj. Ili estas la Kanariaj Insuloj. Ilin konis la fenicaj navigantoj, la sudhispanaj pramaristoj, la grekaj vojaĝantoj, kaj eĉ Sertorius mem vizitis ilin. Nordafrikaj antaŭarabaj blankaj homoj ekloĝis tiun landon en nebula pratempo; mezepokaj araboj enregistris la insularon sur siaj maparoj kaj en siaj priskribaj verkoj, kaj la katalunoj desegnis la unuajn sciencajn geografiajn kartojn, frue, komence de la XIV jarcento. Sed, malgraŭ tio, la insuloj daŭre diktis sian lecionon de rava malproksimo. Ĉar, antaŭe, malproksime en la tempo, kiam ŝipdirektilo kaj preciza marvetura karto estis nekonataj, kiam ankoraŭ la insuloj ne estis enirintaj la geografion kaj la historion, ili sukcese estis atingintaj kategorion de mito. Tio okazis dum la klasika orepoko, kiam ĉiuj estaĵoj ŝvebe glitis en malproksima sorĉravo. Tiam homoj kaj aĵoj akiris mitsignifon. Kaj iĝi mita estas iĝi eterna. Por Kanariaj Insuloj feliĉe okazis tiu evento. De tiam ili mite vojaĝas tra la mondaj horizontoj. Kaj ili mit-elie vojaĝos, dum homoj estos kapablaj je ravo kaj fabelo . . .

### II. LANDO

La Kanaria Arĥipelago konsistas el sep insuloj kaj sep neloĝataj insuletoj. Nomoj kaj ordo de la insuloj laŭ graveco estas: Tenerife, Gran Canaria, La Palma, Lanzarote, La Gomera, Fuerteventura, El Hierro. Ampleksas la insularo proksimume 7,670 kvadratajn kilometrojn; loĝas tie pli ol 600,000

homoj. La arĥipelago, en la zono de mildaj ventoj kaj varmetaj marofluoj, konas nek krudan vintron nek rigoran someron. Ĉe la marbordo nur tre malofte oni registras temperaturojn sub la grado 10 aŭ super 28 de la termometro centgrada.

Post la konkero, kiu daŭris la tutan XVan jarcenton, la indiĝenoj miksiĝis kun la konkerintoj tiel intime, ke jam en la unuaj jardekoj de la XVIa jarcento estis tute neeble distingi konkerintojn de konkeritoj. Kaj tiamaniere la lando tiel funde enradikiĝinta en la menso de la klasikuloj rapidege transformis sian literaturan lokon je komerca kruepunkto inter la mondoj malnova kaj nova. Ŝipoj de Sudafriko, de Nederlanda Hindujo, de Aŭstralio, ŝipoj de Eŭropo kaj Ameriko ornamas la insularhavenojn per siaj multkoloraj flagoj.

La klimatboneco faciligas kreskadon de multaj vegetaĵspecoj sur la antikva mitlando. Sed, paralele, originaj vegetaĵoj fariĝas mondfamaj. Inter tiuj elstaras unualoke tre uzita likeno, la *Lichen Roccella tinctoria Lin.* Ĝi kreskas sur krutegaj montoj, inter rokfendaĵoj, sur la bordoj de altaj ravinoj. El ĝi oni eltiris tre riĉajn tinkturojn. Pro tiu vegetaĵo la arĥipelago nomiĝis "Purpuraj Insuloj" jam dum la antikvaj tempoj. Sed la moderna farbindustrio senvalorigis la ekspluaton de tiu likeno.

Alia fama indiĝena arbo estas tiu nomata drago, la *Dracaena draco Lin.* de la botanikistoj. Ĝi kreskas grandioze, sed ege malrapide. La aĝo de la plej famaj ekzempleroj, ankoraŭ nun vivantaj, kalkuliĝas je miljaroj. Antaŭ ili jarcentoj estas kiel jaroj antaŭ homoj. Laŭ botanikistoj estas dragoj en la insuloj pli aĝaj ol la homeraj eposoj, samtempaj al la faraonoj kaj la egipta civilizo. El tiu arbo oni eltiris, iel simile kiel oni eltiras kaŭĉukon, elastan gumon, tre valoran en klasika farmakopeo. Nun restas nur la arboj, kiuj kreskas spontanee en la insuloj. Sed ĝia "sango", kiel oni nomis la eltiritan gumon, ne estas plu uzata.

Inter la vegetaĵoj de aliaj regionoj nun vaste kulturataj en la insularo, troviĝas la sukerkano, kiu el la arĥipelago pasis al Ameriko; la vito, kies vinoj tre famigis la insulojn dum la jarcentoj XVIIa kaj XVIIIa en Francujo kaj Anglujo; kaj fine la bananoj kaj la tomatoj, kiuj estas la ĉefaj nunaj riĉecfontoj de la regiono. Ankaŭ kulturiĝas terpomoj, ĉiuspecaj cerealoj,



tabako, ktp., kaj kreskas spontanee palmoj, nopaloj*, pinoj, agavoj, erikoj, ktp.

La faŭno ne estas malpli riĉa. Sed la insulojn famigis, unue, la koĉenilo, abunde vivanta sur la nopaloj, kies utiligo daŭris grandskale ĝis la unua mondmilito; la alia besteto estas la birdo, kiun oni nomas kiel la insulojn mem: kanario. Ankaŭ riĉe abundas la fiŝado.

La insuloj estas plenaj de vulkankrateroj. En La Palma estas la plej granda kratero de la mondo: ĝia ĉirkaŭo mezuras 28,000 metrojn, kaj en ĝia interno, grandioza valo, vivas homoj kaj kreskas abunda vegetaĵaro konsistanta el pinoj, fagoj, erikoj, kpt. En la insulo Tenerife leviĝas la monto Teide 3,760 metrojn super la marnivelo; vintre ĝi estas neĝokovrita, sed ĉar la klimato estas tiel dolĉa ĉe la marbordo okazas, ke oni povas skiveturi kaj marbaniĝi dum la sama tago. Sed la kanarianoj, tre bonaj naĝantoj, estas iom rifuzaj je neĝosportoj. Hodiaŭ la vulkanoj ne estas aktivaj. Nur tiam kaj tiam la monto Teide fumetas.

Kanarianoj estas blankaj homoj. Negroj estas tiel maloftaj, kiel en kiu ajn mezeŭropa lando. Plej granda parto el la insulanoj neniam vidis negron. Dum la jarcentoj XVIa kaj XVIIa oni envenigis kelkajn, kiel sklavojn, por la sukerindustrio. Sed ili estingiĝis definitive jam antaŭ longe. La indiĝenoj, je la konkerepoko, estis altaj, blankaj, blondaj homoj, kun lingvoj parencaj al tiuj de la blankaj nordafrikaj prapopoloj.

Kaj tiuj ĉi estas kelkaj el la plej karakterizaj geografiaĵoj de la regiono. La kadro estas blua oceano kaj blua ĉielo. La naturo estas belega, grandioza. Se ne estus la homo, oni vere povus pensi pri la Elizeo.

## III. HISTORIO

Kanariaj Insuloj ekeniris la geografion kaj la historion dum la XIVa jarcento. Hispanoj kaj portugaloj disputis pri ilia posedo. Ĉe la fino de la XVa jarcento oni finis la konkeron, ĝuste en 1492. De tiam la arĥipelago apartenas al Hispanujo.

Antaŭe la insuloj estis nebule konataj. Nur la araboj kaj

* Amerika kakto, kulturata por bredado de koĉeniloj.

maŭroj vizitis ilin dum la mezepoko. Jam estis en ili loĝantoj. Kaj marokanaj piratoj atakadis ilin por akiri sklavojn. Ĉar kelkaj el tiuj sklavoj lernis la araban lingvon kaj rakontis al siaj posedantoj sian vivmanieron sur la insuloj, ni povas hodiaŭ iom scii pri tiu praa pasinto. La unuan mencion certan pri la arĥipelago oni legas en Plinius, sed ĝi estas tre konfuza kaj, kelkloke, eĉ kontestebla.

Tuj post la eltrovo Kanariaj Insuloj estis ambiciataj de ĉiuj maraj imperioj. Portugaloj kaj hispanoj interkonsentis pri la hispana posedo. La amerika eltrovinto riparis la direktilon de unu el siaj velŝipoj en la insulo Gran Canaria. Sed la deziro je la insuloj de aliaj maraj imperioj multe suferigis la insulanojn. Anglaj, francaj kaj nederlandaj piratoj kaperis la hispanajn ŝipojn kaj atakadis la insulojn. Plurfoje la formiĝantaj urbetoj estis fajre detruataj. Drake mem atakis la insularon, sed senrezulte. Ankoraŭ ĉe la fino de la XVIIIa jarcento la angla admiralo Nelson intencis invadi la insulojn. Kontraŭ Santa Cruz de Tenerife li atakis. En tiu batalo li perdis brakon, kaj li ne sukcesis.

Krom tio, la forgeso estas la trajto historia plej elstara. Kanariaj Insuloj estis sensignifaj, nekonata angulo. Nur maristoj kaj vojaĝemaj scienculoj sciis iom pri ili. Dum la napoleonaj militoj, ili estis internejo por francaj militkaptitoj. Tie, malproksime sur la maro, forgesite . . .

## IV. NUNO

En la XXa jarcento, la Feliĉaj Insuloj estas retorika figuro. Eĉ la naturo mem estas malpli grandioza, ĉar la sukerkana industrio, en serĉo de ligno por la hejtado, kalvigis montojn kaj valojn. Tamen io restas el la pasinta impono kaj gloro, ĉar naturo spitas eĉ homon.

La insuloj havas nuntempe du urbojn pli ol 100,000-homajn: Las Palmas de Gran Canaria kaj Santa Cruz de Tenerife. Elektro kaj ŝoseoj, ŝipoj kaj aeroplanoj rapidigas la vivon. Eĉ granda petrolrafinejo malbonodorigas la aeron de Santa Cruz de Tenerife.

Kulturcentro estas la malnova sinjoreca urbo La Laguna, en la insulo Tenerife. Ĝi posedas universitaton kun tradicio pli ol centjara. Tiu universitato nun havas tri fakultatojn: juran, ĥemian kaj filologian. La du lastajn oni kreis en 1920 kaj 1939 respektive. Ĝis 1846 estis ankaŭ teologia fakultato. Samurbe estas ankaŭ supera centro por formado de popollernejaj instruistoj. Ekzistas ankaŭ teknika lernejo por elementa konstruarto kaj por agrokulturado. Krome estas tie ankaŭ la plej grava ŝtata gimnazio de la regiono. En La Laguna estas same la katolikreligia ĉefloko, kun episkopejo, seminario, monaĥ- kaj monaĥinejoj, ktp. Milita ĉefurbo estas Santa Cruz de Tenerife, kaj juĝafera centro estas Las Palmas de Gran Canaria. Ekde 1926 Kanariaj Insuloj formas du hispanajn provincojn.

Hodiaŭ la mondo estas malgranda. Tiel Kanariaj Insuloj estas parto el tiu malgrando. Radio, kino, gazetoj, novaj ideoj kaj aspiroj skuas la animojn de la insulanoj tie ĉi egale kiel en Madrido, Berno aŭ Helsinki. La moderna vivo rapidege glatigas ĉiujn regionajn apartaĵojn. La glatigilo de la nuntempo kuntrenas ankaŭ la Feliĉajn Insulojn . . .

Ni esperu, ke tiu kuntreno ne forportu la ĝisnunan memsufiĉon de la insularaj geografia medio kaj spirita atmosfero!

---

# "Ĝusta persono en ĝusta loko"

*De EINAR HULT*

En la norvega esperantogazeto Esperantobladet Elna Rekve skribis tre interesan artikolon pri la temo "La ĝusta persono sur la ĝusta loko". Ŝi komencas sian artikolon per jenaj vortoj: "Dum la varmega agitado por elektoj ni povis aŭdi multajn agitfrazojn, pli malpli bonajn. Unu el la plej bonefikaj estis la frazo pri "la ĝusta persono sur la ĝusta loko".

Ni klare vidas la avantaĝon kaj utilon de tiu principo. En la industrio, en la komerca vivo, en la scienco, en ĉiuj fakoj de la vivo oni bezonas lertajn kaj taŭgajn homojn. Ne nur lertajn, sed la plej lertajn, tiujn kiuj laŭ kapablo, intereso kaj

edukado taŭgas por ĝuste tiuj oficoj kaj tasko. Tiel profitos la fabriko, la kontoro, la lernejo ktp., ĉar ili atingos la plej bonajn rezultojn. Sed ankaŭ la homo profitos, ĉar la laboro feliĉigos lin, kontentigos lin kaj instigos lin al plua laboro. Sed kian vojon elekti por atingi tiajn idealajn statojn? Tre malfacila demando!

La temo, kiun Elna Rekve pritraktas en sia artikolo, sendube apartenas al la pli implikitaj kaj problemecaj, ĉar kiel ebligi al ĉiu homo veni en la ĝustan lokon au oficon? Elna Rekve rekomendas interalie: Unue ni devas doni al la junularo ŝancojn por edukado. Se en homo troviĝas specialaj kapabloj kaj interesoj, la socio devas permesi al ili evolui kaj permesi al la homo elekti sian laboron.

Laŭ mia opinio la gejunuloj ĝenerale havas ŝancojn por edukado, sed kiom multaj el ili vere utiligas tiujn ŝancojn? La nombro da junuloj, kiuj vere montras ian emon pliboniĝi siajn sciojn aŭ perfektigi sin en sia metio estas hontinde malgranda! Precipe inter laboristoj troviĝas tro granda nombro da personoj, kiuj ne utiligas la rimedojn, kiuj jam ekzistas por pliboniĝi la edukadon. En Svedujo ni havas specialan laboristan klerigasocion, kies celo ĝuste estas doni al la gejunuloj la necesajn sciojn, au almenaŭ ebligi al ili kompletigi la sciojn, kiuj nepre necesas por kompetente prizorgi oficon, kiu eble logas. Ni do ne rajtas kulpigi la socion, sed la junularon, kiu ne utiligas la "helpilojn", kiujn la socio jam starigis! Mi samopinias kun Elna Rekve pri tio, ke la socio jam faris multon.

Sendube troviĝas multaj tipoj da homoj, kaj Elna Rekve pravas skribante, ke la studado de la diversaj tipoj estas interesa. Certe necesas intima kunlaboro inter laboristoj kaj psikologoj. Kun intereso mi persone legis la desegnadon pri la du ĉeftipoj, nome la "internenturnita" kaj la "eksterenturnita". La internen turnita tipo estas plej ofte inerta, ĝisfunda en la laboro, forta en siaj opinioj. La eksteren turnita homo posedas tute aliajn ecojn: li estas vigla, ŝanĝiĝema en humoro sed plej ofte bonhumora, optimisto. Estas facile interrilati kun li.
"Tiuj tipoj nur tre malofte troviĝas en "pura formo". Preskau ĉiam la homoj estas miksaĵo el la du tipoj, pli malpli bona miksaĵo ..." Por studi ĉi tiun aferon oni en kelkaj landoj havigis specialajn "personarajn konsilantojn". Iliaj taskoj estas tre gravaj: Ili devas konatiĝi kun la laboristoj, studi ilin dum ilia laboro kaj fari psikoteknikajn provojn. Per tio ili eltrovas, ĉu la firmo havas la plej bonan utilon de la homo, kaj ĉu la homo estas kontenta.



Ankaŭ en Svedujo kelkaj firmoj havigis tiajn "konsilantojn", kaj kvankam mi ne persone havis la ĝojon esti objekto por la psikologiaj studoj de tiaj konsilantoj, mi tamen pere de amikoj informiĝis pri la utilo kaj neceso havigi grandan nombron da tiaj konsilantoj. Sed bedaŭrinde ne ĉiuj konsilantoj estas "la ĝusta persono sur la ĝusta loko". Kelkaj el ili pli atentas la studon, ĉu la firmo havas la plej bonan utilon de sia laboristo, kaj ne multe studas, ĉu la laboristo ricevas tian laboron, kiu kontentigas lin. Do ankaŭ la konsilantoj ne ĉiam apartenas al la tipo "purforma".

Troviĝas risko, ke kelkaj konsilantoj diskutante la psikoteknikajn rezultojn kun la ĉefoj ne ĉiam rekomendas ĝuste tiun laboron, kiu plej plaĉas al la laboristo. Eble ili male rekomendas tian laboron, kiu donas al la ĉefo la plej bonan profiton. Ekzemple, se la laboristo eventuale apartenus al la unua ĉeftipo de homoj, kiu interalie estas lerta en sia laboro, ĝisfunda, kaj ne parolema: ĉu la ĉefoj ĝenerale emas doni alian laboron al tia laboristo? Ĉu li povas garantii, ke la konsilanto en tia okazo ne pli atentas la dezirojn de la ĉefoj ol tiujn de la laboristoj?

Objektiva kaj scienca studado pri la psiko kaj laborĝojo de laboristo certe ne ĝenos la laboristojn en ilia laboro, sed se la laboristoj komprenas, ke la studoj okazas por doni al la labordonantoj ankoraŭ pli grandan profiton, la nova scienco ne estos populara! En tia okazo ĝi renkontos la saman kontraŭstaron kaj abomenon kiel la "tempostudoj", kiuj estas praktikataj en multaj industrioj por malaltigi la produktokostojn. Per tiuj tempostudoj oni jam grave detruis la nervojn de multaj laboristoj. Pro tio la laboristaro ne ĉiam kun tre granda entuziasmo salutas ĉiun novajon, kiun oni volas praktiki!

Motivigante la tempostudojn la labordonantoj interalie diras,

ke tiaj studoj estas necesaj por raciigi la produktadon kaj tiamaniere ebligi al la firmo sukcese konkurenci kun aliaj firmoj. Ĉu estas strange, ke la laboristoj ne faras sian plejbonon por altigi la produktadon, kiam ili ne ricevas kompenson por la kresko de la produktokvanto? Ju pli multe da varoj, kiujn la laboristoj produktas, des pli frue alvenas la tago, kiam la ĉefoj ne plu bezonas la servojn de la laboristoj. Kaŭze de tio ne estas strange, se la laboristoj montras nur malvarmetan intereson al la raciigado de la labormetodoj. Por veki ilian intereson oni nepre donu pli bonan rekompencon!

Fine de sia artikolo Elna Rekve demandas, ĉu la demando pri "la ĝusta persono sur la ĝusta loko" ne estas grava ankaŭ por nia movado t. e. la esperanta? "Por ke ĝi kresku kaj floru, ni bezonas la tutan forton de la membroj.

Estas necese, ke ĉiuj laboras kiel eble efektive. Estas ne facile atingi tiun rezulton, sed estas tute eble. Mi proponas solvon: Ni provu analizi la membrojn, eltrovi iliajn interesojn, "kaŝitajn talentojn", ni studu la tipojn, kaj ni provu doni al ili la plej konformajn taskojn. Estos interesa laboro por la gvidantoj de la movado. Kaj grava laboro. Demando: Kiel okupi la esperantistojn tiel, ke ili plej bone agas por nia afero kaj samtempe sentas sin feliĉaj dum la agado? Ni devas atingi tiun celon, ĉar nur kiam ni havos laboremajn, fidelajn anojn, nur tiam ni havos la fundamenton, sur kiu ni konstruos nian konstruajon."

Estus interesa laboro por la gvidantoj! Ne ekzistas dubo pri tio, ke la tuta laboro estos pli interesa ne nur al la gvidantoj, sed ankaŭ al la anoj, se oni provus sekvi la bonegajn proponojn kaj instigojn, kiujn Elna Rekve donis en sia artikolo. Antaŭ ĉio estas necese al la esperantokluboj havigi membrajn "konsilantojn", kiuj faras sian plej bonan por malkaŝi la "kaŝitajn talentojn". Se la konsilanto trovas iun kaŝitan talenton li nepre donu al tiu ano komision, kiu plaĉas kaj kontentigas. Tiel la anoj ĉerte kun pli granda entuziasmo emas viziti la kunvenojn de la grupoj. Kaj tiamaniere kreiĝas la fortika fundamento, sur kiu ni konstruu nian konstruaĵon.



La esperantomovado konsistas el pluraj tipoj de homoj, kiuj inter si tre diferencas, sed ion ili ĉiuj havas komune, nome la amon al Esperanto. Por la bono de Esperanto ili eĉ pretas fariĝi objektoj de eksperimentado flanke de psikologoj, se tio iel servas por atingi la celon!

---

## La dualismoj

De MOGENS MUNCH

La verkinto de tiu ĉi art. estas disĉiplo de dana religia-filozofia instruanto, Martinus, kaj la pensoj estas ĉerpitaj el la ĉefverko de tiu, "La libro pri la vivo". En la grandaj danaj urboj ekzistas de 13 jaroj studrondoj, kiuj studas la verkojn de Martinus. De 1939 oni uzas esperanton por diskonigi la instruojn. Se la legantoj ne komprenos aŭ ne aprobos ĉion en la art., ĝi espereble tamen donos impulsojn al pensado — kaj tio certe estas ĝia ĉefa celo.

S. Engholm

Studante la evoluon de la homa konscio oni atentas, ke jam de la unua malforta apero ĝi agis laŭ granda principo en la naturo, nome la kontrastprincipo. Jes, eĉ ĉe la plej primitivaj organismoj oni povas vidi, ke ili agas laŭ tiu principo tiamaniere, ke ili nature kaj aŭtomate klopodas altiri kaj konservi agrablajn statojn kaj eviti kaj forpuŝi malagrablajn. Tiu principo regas la vivon de ĉiuj vivantaj estuloj — plantoj, bestoj kaj tiu speciala besta speco, kiu estas nomata la tera homo.

Kiel la unuaj vivspertoj estas faritaj rilate al tiu granda principo, tiel ankaŭ la unuaj pensoj kaj konceptoj estas formitaj laŭ ĝi. La primitiva homo spertas la fortojn de la naturo en sia ĉiutaga vivo: kelkaj el ili estas agrablaj, — t. e. iliaj efikoj estas por li agrablaj, — kaj aliaj estas malagrablaj. Tiu vivsperto havas diversajn efikojn, kaj du el ili ni rigardos.

La unua estas la jam priparolita, ke la homo — agante laŭ treege malnova instinkto — klopodas konservi la agrablajn sta-

tojn kaj kontraŭlabori la malagrablajn. Nu, la homo ja ne povas influi la fortojn de la naturo tiamaniere, ke li kapablas ŝanĝi veteron aŭ sezonojn, sed la vivbatalo evoluigas iom post iom la penskapablon de la homo tiamaniere, ke li komencas elpensi ilojn, per kiuj li povas eviti la plej malagrablajn efikojn de la naturfortoj, kaj jen la unua origino de la teknika evoluo.

La dua efiko de la vivsperto de la primitiva homo eble estas eĉ pli interesa. Fundamenta trajto ĉe naturhomo — kaj ankaŭ ĉe malgrandaj infanoj, kiuj dum siaj infanjaroj ripetas la tutan homan evoluon — estas, ke ili posedas treege logikan pensmanieron. Tiu pensmaniero funkcias tiamaniere, ke ili ne akceptas problemon sen klarigo. Sed ĉar ilia pensokapablo estas relative malgranda (ili havas nur malmultajn spertojn pri la vivo), la klarigo ofte ŝajnas al ni naiva aŭ ridinda, sed rilate al ilia propra konscio ĝi vere estas "logika", t. e. ĝi estas konstruata helpe de scio kaj spertoj, kiujn ili mem faris. Ekz. ili ne kontentas konstati, ke en la naturo laboras grandegaj "fortoj", kiujn ili spertas kiel blovegon, tertremon, inundondegon ktp. Por ili ne estas kontentige nur doni al la fenomenoj "nomojn"; la moderna homo ofte kontentas per nomo, kiu tute ne estas klarigo, sed nur signifo de sperto, ĉar li mense troviĝas en stato, kie la logika pensmaniero de la naturhomo estas mortinta, kaj la logiko de memkreita scio ankoraŭ ne estas perfekta. Por la naturhomo la nomo aŭ signifo "forto" tute ne estas klarigo de fenomeno. Por li forto ĉiam estas *"eco de vivanta estulo"*, ĉar tiamaniere li spertas tiun parton de la kosmo, kiu por li estas komprenebla, nome lia propra ĉiutaga vivo: se en ĉi tiu sfero io devas esti farata, li estas devigata uzi siajn proprajn "fortojn"! Li do uzas ĉi tiun scion provante klarigi al si la pli grandan parton de la kosmo. La rezulto de tiu klarigo estas, ke ni ekz. en la pranorda koncepto pri la fulmotondro trovas klarigon, kiu estas pligrandigita bildo de ĉiutaga sperto el la homa vivo: Kompreneble estas grandega estaĵo — la dio Thor — kiu en sia grandega veturilo rapide veturas sur la nuboj. La tondro estas la bruo de la radoj kaj la hufoj, kaj la fulmoj estas la fajreroj de tiuj! Tia klarigo vere estas "logika" — eĉ se ĝi ja estas primitiva — ĉar ĝi estas bazita



sur homaj spertoj kaj ne estas ŝvebantaj spekuladoj. Ankaŭ aliaj primitivaj religioj estas plenaj de "veraj klarigoj", t. e. rakontoj, kiuj uzas elementojn, kiuj estas spertitaj de ĉiuj homoj. La aŭstralaj naturhomoj ekz. havas specialan koncepton pri la maniero, per kiu la mortintoj alvenas al la "paradizo". Ĉar paradizo ja ne estas trovebla sur la tero, ĝi devas esti en la ĉielo, kaj por veni tien necesas, ke la spirito de la mortinto kaptas falantan stelon kaj per ĝi grimpas ĉielen! Por li tute natura klarigo, ĉar ŝvebi aŭ flugi estas neeble por la homo, tion li bone scias! Kaj oni povas trovi multajn tiajn klarigojn pri la vivo kaj la naturo en la legendoj de primitivaj homoj.

Por la primitiva homo la okazaĵoj en la naturo estas efikoj de grandegaj estaĵoj — de dioj aŭ spiritoj — kiuj tute similas al li mem, sed nur estas multe pli grandaj kaj fortaj en ĉiuj rilatoj, fizike kaj anime. Kelkaj el ili estas bonaj kaj amikaj estuloj, aliaj estas malbonaj kaj malamikaj, kaj rilate al tiu koncepto la unuaj religiaj pensoj estis formataj. La dualismo: "la bono" kaj "la malbono" troviĝas en ĉiuj religioj — eĉ se tiuj konceptoj estas iomete transformataj de la primitiva stato al la nuntempa stato — kaj ĝi estas evidenta efiko de la vivspertoj. Por la primitiva homo la "spiritaj estaĵoj" malantaŭ la fortoj de la naturo estis treege realaj, kaj granda parto de lia diservo estis klopodo por mildigi tiujn estaĵojn per oferoj ktp. Entute oni povas diri, ke por la naturhomo ne estas diferenco inter lia religia vivo kaj ĉiutaga vivo. Ĉio, kion li faras, estas farata post demando al la dioj.

Sed la evoluo de la homa konscio kaŭzis, ke la religia vivo iom post iom estis forpuŝata de la tiel nomata "praktika" vivo kun ĝia teknika kaj scienca evoluo. Ŝajnis al la homoj, ke nur tiu nova scio, kiu intime kontaktas kun la materia mondo, estas "reala", kaj tiamaniere alia dualismo aperis kaj estis fortigata, la dualismo inter "spirito" kaj "materio". La religio ne ludas gravan rolon en la praktika hodiaŭa vivo. La moderna homo havas tempon nur dum unu tago semajne pripensi la religiajn problemojn, kaj multaj homoj ankaŭ eĉ tiun solan tagon ne pripensas la religian flankon de la vivo, ĉar tiu flanko laŭ ilia koncepto tute ne ekzistas. Ili ja neniam spertis ion, kio po-

vas pruvi la ekzistadon de tiu flanko, kaj do estas senutile uzi tempon kaj energion por pripensado.

Aliaj homoj kontraŭe sentas, ke certe estas "io" en la kosmo, kio regas tiun kosmon, sed ili ne kapablas klarigi al si tiun "io"n. Ankaŭ ŝajnas al ili, ke estas strange, ke ĉiopova, ĉioamanta estaĵo, pri kiu la religio rakontas, permesas okazaĵojn kiel mondmilitojn, malsaton de miloj da homoj, malsanojn ktp. Estas por ili nekomprenebla dualismo, kaj ili ne kontentiĝas per la vortoj, kiuj trankviligis pli frue ekzistantajn homojn, nome ke "la vojoj de Dio estas neesploreblaj!" La materia scienco en tiom alta grado montris al ili, ke la homa penskapablo povas kompreni kaj klarigi partojn de la kosmo, kiuj pli frue estis tute misteraj kaj nekompreneblaj, kaj pro tio ili — tute prave — opinias, ke oni ankaŭ rajtas demandi pri "la vojo de Dio". Sed ili ne kapablas doni la klarigon! Ŝajnas esti netransirebla baro: la tiel nomata "malbono" aŭ "neperfekto" en la vivo de la estaĵoj.

La rezulto de tio estas, ke al la nuntempa homo mankas direktanta forto. Ekzistas multaj konceptoj pri tio, kiamaniere la mondo kaj la homaro estu gvidataj kaj regataj, *kaj* religie *kaj* politike, sed eĉ se la celoj multe similas unu la aliajn, la vojoj, kiuj kondukas al tiuj celoj, treege diferencas. Kaj ĉar ĉiu opinias, ke li pravas, nenio grava estas farata por plibonigi la vivkondiĉojn de la homaro. Jes, mi bone scias, ke preskaŭ ĉiuj homoj deziras, ke la mondo estu alia, sed se oni postulas de ili, ke ili faru "ion realan" por ekhavi tiun belan novan mondon, ili "bedaŭrinde" ne havas tempon por tio, aŭ ili preferas atendi ĝis kiam aliaj komencos. Kaj se fine iu komencas, tiam ili certe ne interkonsentas pri la rimedoj.

Ĉar la homo ne kapablas solvi la problemon de la jam priparolitaj dualismoj, li ne povas trovi la vojon, kiu kondukas al eterna paco. Sed tiu problemo tamen estas solvebla! De pli alta vidpunkto ol la ordinara terhoma tiuj dualismoj nur ŝajne ekzistas, sed reale ili aperas kiel kontrastaj flankoj de unu sola principo.

Mi ne mem posedas tiun vidpunkton, sed ĝi estas montrita al mi, kaj studante la klarigojn mi iom post iom komprenis, ke ne temas pri postulo nereala, sed pri pruvebla kaj spertebla



fakto, kaj multaj aliaj homoj ol mi jam studis tiujn analizojn, kiuj kondukas al tiu scio. Tiuj analizoj estas kreitaj de dana viro, nomata MARTINUS.

Certe vi ne postulas de mi, ke mi ĉi tie donu al vi la tutan klarigon, ĉar tio ne estas ebla. La tuta klarigo — kiu kaŭzas, ke oni en si mem sentas, ke la eldiritaj pensoj vere kontaktas kun la vivo — estas akirebla nur per studado de tiu scio, sed mi eble povas montri al vi parton de tiu vojo, kiu kondukas la studanton al la tuta klarigo, kaj nur tion mi intencas.

Martinus montras al ni, ke ĉiu vivanta estulo vivas eterne — ĝi ĉiam ekzistis kaj ĉiam ekzistos. Tiu eterna vivsperto okazas kontakte kun granda ĉion-reganta kontrastprincipo. Ni bone konas tiun principon de niaj ĉiutagaj spertoj: Nia vidkapablo funkcias baze de la kontrasto inter lumo kaj mallumo, nia aŭdkapablo funkcias baze de la kontrasto inter silento kaj sono, ktp. Sed ne nur tiaj spertadoj, sed ĉiuj spertadoj — *kaj* fizikaj *kaj* spiritaj — okazas baze de kontrastprincipo. Oni ne povas sperti ion, se oni ne antaŭe spertis la kontraŭan staton. Kaj tio vere donas al ni tute alian fundamenton por nia prijuĝo de la vivo.

En la besta regno ni vidas, ke la vivantaj estaĵoj spertas evolucpokon, en kiu la mortiganta principo estas tiel fundamenta, ke la bestoj tute ne povas vivi ne uzante tiun principon. Ni vidas, ke la rabobestoj posedas organojn, kiuj perfekte solvas la problemojn ligitajn al tiu speciala vivmaniero. Sed ni vidas ankaŭ ke la estuloj semas doloron al siaj kunuloj, kaj rikoltas doloron.

Tiu doloro efikas, ke en la malgranda, primitiva konscio de la bestoj iom post iom vekiĝas sopiro al la kontrasto. Kiam estaĵo dum sufiĉe longa tempo spertis la saman staton, ĝi neeviteble estos satigata, kaj tiu satigo naskas sopiron al la kontrasta stato. En primitivaj homaj evolustatoj, jes eĉ en la pranorda religio, ni vidas, ke ankoraŭ estas "la batalo", kiu enhavas la veran ĝojon de la vivo — kaj nur per tio, ke la viro mortas batalante, li post sia morto certe alvenos al la eternaj dioj. Sed la homa konscio iom post iom *satiĝis de tiu vivmaniero*. La sopiro al la kontrasto fariĝis tiel forta, ke la kristanismo, kiu enhavas la tute kontraŭan vidpunkton, iom post

iom komencas regi la vivon kaj la sopirojn de la homoj. Tiu ŝanĝo ankoraŭ ne estas finita. Laŭ sento la homoj estas altirataj al la kristanismo, sed laŭ kutimo ili ankoraŭ agas laŭ treege malnovaj idealoj, kiuj dum jarmila evoluo regis ilian konscion. Sed la ŝanĝo okazas! Kaj la homo teorie vidas, ke estus pli bone, se oni vivus kaj agus laŭ tiuj novaj idealoj. Se nur aliaj komencus — tiuokaze ili mem certe sekvus!

Ŝajne ja estas pli profitige pripensi nur siajn proprajn aferojn, kaj tute ne interesi sin pri aliaj homoj? Oni vivas ja nur unufoje?

Sed *ni vivas eterne!*

Kaj niaj vivoj estas koloritaj de tio, kion ni faras kontraŭ niaj kunuloj. Temas ne nur pri la fizika flanko de niaj agoj, sed ankaŭ pri la spirita. "Pensoj" kaj "opinioj" ne estas "nenio". En diskutoj pensoj ofte kaŭzas efikojn, kaj se ili estus "nenio", tio ne povus okazi. Sed same kiel radio-ondoj ne estas videblaj aŭ senteblaj de la homa organismo sed tamen estas treege realaj por alia "sent-organo" (radio-ricevilo), sammaniere la pensoj estas "ondoj" sperteblaj nur de specialaj "spiritaj organoj". Fakte la dualismo inter "materio" kaj "spirito" tute ne ekzistas. Temas nur pri diferencaj specoj de materio. Sed ĉar ni plej bone konas tiun ricevilon, kiun ni nomas "la fizika korpo", ni neprave rigardas ĝin la plej grava — jes eble la sola ekzistanta — organismo, sed la homo (kaj ĉiuj aliaj estuloj) posedas spiritajn organojn, kiuj estas same gravaj, kaj per ili la estuloj spertas pli aŭ malpli grandajn partojn de sia estado. Nur malmultaj homoj spertas la vivon nur materie; la pri granda parto de la vivo de ĉiuj civilizitaj homoj enhavas spiritajn spertojn kiel ekz. legadon de libroj, teatraĵojn, prelegojn, interparoladojn ktp.; tiuj okazaĵoj certe havas materian flankon, sed ilia esenco absolute estas spirita, kaj estas "ricevata" per "spiritaj organoj".

En la besta regno preskaŭ nur la fizika aŭ materia korpo funkcias, ĉar la spiritaj korpoj ankoraŭ ne estas evoluintaj. Sed la evoluo de la besta al la homa stato ja estas evoluo de tiuj spiritaj organoj aŭ korpoj. La homo iom post iom komencas estri tiujn novajn korpojn same bone kiel li estras la fizikan.

Sed tiu evoluo montras al ni ankaŭ alian problemon. Tiu doloro, kiu ludas tiel gravan rolon en la evoluo de besto al homo, estas la absoluta kaj necesa fundamento por la vera amo al la kunulo. La homo ĝisfunde komprenas nur tion, kion li mem spertis. Kaj tio estas la plej grava rolo de la doloro, ke ĝi en la besto evoluigas la homon — la veran homon.

Pro tio Martinus ne uzas la nomojn "malbono" kaj "bono" sed anstataŭe: "malagrabla bono" kaj "agrabla bono". Se ne ekzistus zono, en kiu la vivanta estulo spertus — ĝisfunde — tiun vivmanieron: pensi nur pri si mem, kaj ne al aliaj estuloj, kaj dum tiu periodo spertus ankaŭ tion: ne koni Dion, tiuokaze en ĝia konscio neniam estus kreata tiu kontrasto, kiu permesas al li la plej ĝisfundan kaj inspiran kontakton kun la pensoj de Dio, t. e. kun la leĝoj de la vivo kaj la kosmo. La nuntempa terhomo estas meze inter du statoj: perfekta besta stato kaj perfekta homa stato. En lia konscio troviĝas malnovaj — kaj malfacile forviŝeblaj — talentoj, kreitaj rilate al la humana animo. Inter ili okazas spirita batalo, kiun ni spertas tra la agadmaniero kaj la sorto de la homo.

Sed la homo pli aŭ malpli frue ekvidos, ke ankaŭ la dualismo inter "malbono" kaj "bono" ne estas vera, kaj kaŭze de tio li komencos agi laŭ vera toleremo: kiam oni komprenas, ke ĉiu estulo devas agi laŭ sia propra scio pri la vivo kaj ne kapablas agi laŭ scio, kiun li ankoraŭ ne atingis, tiam oni ne furiozas sed pacience provas montri al li lian eraron, aŭ provas instrui lin — ne pere de batoj sed pere de kompreno kaj helpemo. Tiamaniere oni ne ekhavos malamikojn sed nur amikojn. Kaj tiu instruo, kiu vere estas instruo de Dio, okazas tiamaniere, ke ĉiuj partoprenas: ĉiuj estas lernantoj, sed ĉiuj estas ankaŭ instruistoj — iloj en la mano de Dio. Dolora instruo estas ankoraŭ bezonata, kaj Dio ankaŭ havas ilojn por tio, sed kaŭze de la kreskanta scio pri la vivo ekzistas nun granda nombro da "iloj" por la instruado, kaj ili fariĝos fundamento por eterna paco.

---

## La fajrofesto

De STELLAN ENGHOLM

Komence de aprilo aperis la unuaj nudaj lokoj en la vintra blanko. Tiam la infanoj en nia vilaĝo komencis kolekti brulaĵon por la printempa fajro.

Jen venis la unuaj trenante branĉoŝarĝojn, kiujn ili metis en la mezon de la granda terpomkampo. Vidante tiujn la aliaj knaboj kaj la pli multaj el la knabinoj estis kaptataj de neordinaraj entuziasmo kaj samsento. Ili rapidis al la lignejoj kaj post kelkaj momentoj aperis kun ŝnuregoj kaj hakiloj, kelkaj eĉ kun grandaj puŝĉaroj: Sen bruo kaj diskuto ili dividis sin en grupetojn, kiuj iris en diversaj direktoj por kolekti en la ĉirkaŭo ĉion, kion fortoj kaj konscienco permesis.

Oni forgesis disputojn kaj malpacon, akraj malamikoj fariĝis amikoj. Netuŝataj kuŝis en la poŝoj plumboglobetoj kaj aliaj bataliloj. Furiozuloj fariĝis helpemaj kamaradoj, kruduloj blasfemantaj kaj maldecaj kondutis modeste kaj bonedukite. Ĉiuj harmonie laboris por unu sola, komuna celo.

Sed unu printempon okazis alie.

La kolektado komenciĝis kaj okazis dum kelkaj tagoj kiel ordinare, ĝis Emil Byggman kaj mi iun vesperon malpaciĝis kun du pli aĝaj knaboj. Emil kaj mi trovis piceon, kiun la vento faligis. Ni segis ĝin ĉe la radiko kaj ĝuste komencis fortreni ĝin, kiam la aliaj, laborantaj en kelka distanco de ni, ekvidis nian trezoron. Neniam, ili diris, ni povos treni hejmen tian ŝarĝon, kaj se ni provos, ni trostreĉos kaj difektos nin.

Ni komprenis la intencon kaj sendiskute rifuzis. Kaj ili ne tro provu, ni diris. Se bezonate, ni havas rimedojn por defendi nin.

Tio estis batalsignalo.

La manoj de Emil kaj mi rapide malaperis en la poŝoj por serĉi konvenajn defendilojn, sed ni ne trovis tempon eltiri ilin, antaŭ ol la aliaj superfortis nin. Baldaŭ ni kuŝis venkitaj kun la



buŝoj ŝtopitaj per vakcinioj kaj musko, dum la aliaj kun venkoblekoj forportis nian piceon.

Ni sidigis nin, elkraĉis la plimulton el la aĉaĵo kaj rigardis unu la alian.

— Kiaj idiotoj! diris Emil fine kaj ekploris pro kolero.

— Sed nun estas finite, li subite elkriis per pli firma voĉo, nun estas finite! Eĉ branĉeton mi ne portos al ilia fajro, eĉ arbopinglon mi ne alportos. Iliaj aferoj ne koncernas nin. Ni ja povos havi propran fajron, ĉu ne?

Ni eksentis fortan malican ĝojon kaj decidis tuj komenci. En la unuaj momentoj de la nova entuziasmo ni forgesis eĉ respekton al fremda posedaĵo kaj atakis kreskantajn junarbojn. Kolero kaj fervoro duobligis niajn fortojn. Post nelonge ni venis el la arbaro, ĉiu el ni trenante piceon preskaŭ same grandan kiel la perdita.

Ĝojkrioj salutis nin, kaj multaj alkuris por helpi. Niaj venkintoj kaj kelkaj aliaj tamen restis surloke.

Dume ni esplore rigardis la terenon kaj decidis meti nian fajron en liberan lokon cent metrojn for de la terpomkampo. Laŭ tio ni ŝanĝis direkton. La alkurantoj eksilentis, haltis kaj gape rigardis nin. Poste ili proksimiĝis por ricevi klarigon pri nia stranga konduto. Post malmultaj vortoj ili komprenis, ke nia afero estas justa. Ili partoprenis nian koleron kaj nian novan entuziasmon kaj helpis nin porti niajn ŝarĝojn al la elektita loko.

Jam en tiu vespero ĉiu el la vilaĝaj infanoj apartenis al unu aŭ la alia de du malamikaj grupoj. Ambaŭflanke ni decidis elteni ĝis la fino kaj nepre gajni kaj ridindigi la alian partion. La partio de Emil kaj mi estis la pli multnombra, sed niaj malamikoj estis pli aĝaj kaj pli fortaj, kaj tial la du fortoj estis proksimume egalaj.

Ĉar ni unu kontraŭ unu estis malpli fortaj ol la aliaj, ni devis esti singardaj. Kiam ni posttagmeze iris en la arbaron, ni estis bone ekipitaj kaj batalpretaj, kaj ĉiu grupo estis tiel granda, ke ĝi povu defendi sin, ĝis helpo venos.

Kelkfoje estiĝis iom da batalo, kiam malamikaj grupoj tro proksimiĝis unu al la alia kaj ekdisputis pri trovaĵoj aŭ komencis insulti unu la alian. Entute la afero tamen evoluis pace.

Ambaŭflanke ni pensis preskaŭ sole pri kreskigo de niaj branĉostakoj. La pli granda signifos venkon al la posedanto.

Ni trenis kaj penis per ĉiuj fortoj, sed la branĉamasoj tamen restis proksimume samgrandaj. Tio estis preskaŭ same malgajiga kiel malvenko. Iom konsolis nin tio, ke Emil sukcesis akiri malplenan gudrobarelon. Ni provizore kaŝis ĝin inter la branĉoj. Kiam ni bruligos la branĉamason ni levos ĝin sur alta stango, kaj ĝi ekflamos.

La vesperon antaŭ la lasta de aprilo nia grupo post bona laboro staris kolektita ĉirkaŭ nia stako. Ni malmulte ĝojis, ĉar ambaŭ amasoj estis ankoraŭ same grandaj. Regis malbonhumora silento en la rondo, kaj malkontente-grumbleme ni rigardis al la malamika grupo sur la terpomkampo. La gudrobarelo estis nia sola triumfo, sed ni trovis ĝin tro malgranda. Ni antaŭsentis, ke la grandaj, kiuj havis amuzon de nia lukto kaj instigis nin labori ankoraŭ pli, nur mokos nin, ĉar ni ne sukcesis pli konvinke montri nian superecon.

Emil, nia gvidanto, ŝajne suferis same multe kiel ni aliaj kune. Li trotetis ĉirkaŭ la branĉostako, mezuris per la rigardo ĝian amplekson kaj blasfemis kaj ĝemis pro ĝia malgrandeco.

— Tio ĉi ne taŭgas, li lamentis. Diablo min prenu, se tio ĉi taŭgas. Ni devas ion eltrovi. Ne gapu tiel, sed helpu eltrovi ion!

Je la krepuskiĝo, kiam ni estis pretaj iri hejmen, terura rideto subite vivigis la vizaĝon de Emil.

— Jen mi ektrovis! li diris kaj forte bridis sin, por ke la malamikoj ne rimarku, ke io speciala okazas sur nia flanko.

— Nun ni iru hejmen por manĝi la kaĉon, sed post tio ni eliros denove, vi komprenas, kaj jen ni prenos ilian tutan amason kaj metos ĝin sur nian. Ĉu vi komprenas?

La propono ŝajnis tiel aŭdaca, ke ni komence ne konsideris ĝin serioza. Samtempe ĝi estis tiom loga, ke ni ne povis longe kontraŭstari. Ĉiuj, kiuj havis iom da ebleco eliri tiel malfrue, promesis veni.

Post iom da tempo ni renkontiĝis, deko da knaboj, en la ĉefstabejo de la malamiko. Ŝirmitaj de la mallumo ni plenumis la plej intensan laboron, kiun mi iam partoprenis. Post unu



horo ne restis eĉ branĉeto de la diligenta klopodado de la malamikoj, sed nia stako estis granda kiel domo.

Laŭ interkonsento la tuta grupo kolektiĝis la postan matenon ĉe mia hejmo, kaj poste ni kure direktis nin al la lernejo. Ni ne volis batali, se ne estis necese. Ĉiuj fortoj certe estos bezonataj antaŭ la fino de la tago. Niaj malamikoj samaĝaj ŝajnis atakemaj, sed ili ne kuraĝis ataki, ĉar ni estis pli multaj kaj restis ĉiam kune. Feliĉe la pli aĝaj knaboj laboris kaj kelkaj estis en antaŭkonfirma instruo. Alie nia tuta stako certe estus reirinta al la terpomkampo jam antaŭ nia hejmenveno posttagmeze.

La situacio fariĝis pli kaj pli streĉa laŭ la paso de la tago. Ankaŭ plenkreskuloj komencis serioze okupiĝi pri nia lukto. Viroj sen propraj malgrandaj infanoj admonis nin, ke ni ne cedu. Cedi nun estus honto malfrue forgesota. Kaj niaj patroj kaj patrinoj promesis je ĉiuj bonaj kaj malbonaj potencoj, ke ili vergos nin ĝissange, se ni entreprenos iujn stultajojn.

Ni decidis resti en la hejmoj kiel eble plej longe kaj dume observi la stakon. Se niaj kontraŭuloj aroge proksimiĝus al ĝi, ni tuj elkuru por renkonti ilin sur duona vojo.

Tamen nenio okazis, ĝis oni en la dometoj sidis ĉe la vespermanĝo. Tiam subite eksonis kriego, aŭdebla almenaŭ du kilometrojn. Estis Emil, kiu pli fidele ol ni aliaj prizorgis sian gardon kaj faris signalon. Al ni ĉiuj estis malpermesite fari tumulton, tamen en la sekvanta momento ni ĉiuj estis ekstere. Tiel rapide ni elkuris, ke verŝajne neniu havis tempon eĉ por pensi, ke oni haltigu nin.

Ni vidis, ke niaj kontraŭuloj staras ĉirkaŭ la stako. Antaŭ ol definitive daŭrigi ĉiu el ni kaptis bastonon de branĉoligna amaso apud lignejo. Poste ni ekkuris kiel aro da liberaj ĉevaloj en galopo.

Pri interpaciĝo ni eĉ ne pensis, la aliaj certe same malmulte kiel ni. Tiuj, kiuj alvenis unuaj, atakis furioze per siaj bastonoj. Tiuj armiloj cetere donis al ni neatenditan superecon, ĉar la malamikoj estis kiel ordinare vire armitaj per flartabakaj skatoloj, plumboglobetoj, feroringoj kaj kunplektitaj ledorimenoj. Niaflanke ni momente havis la senton ke estas nevire gesti

per bastonoj, sed ni tuj forgesis tion, kiam ni trovis, ke ili estas efikaj.

Nia supereco estis tamen nur ŝajna. La aliaj estis pli grandaj kaj fortaj, kaj ili baldaŭ senarmigis duonon el ni kaj renkontis nin per niaj propraj bataliloj. Malgraŭ tio la lukto ne malfortiĝis, kontraŭe ĝi fariĝis pli intensa. Neniu ricevis gravan korpan difekton, sed tio dependis de bona ŝanco kaj ne de mildeco. Kelkaj estis tamen tiom batitaj, ke ili restis surtere, kaj iliaj vizaĝoj montris, ke ni kondutis ne delikate.

Kiam ni ankoraŭ troviĝis en akuta bataldeliro, ni subite rimarkis, ke novaj fortoj alvenas. Granda fortika viro subite aperis meze en la kirlaĵo de knabaj korpoj, fortiris la bastonon de unu el la batalantoj kaj donis al li vangofrapon, kiu faligis lin.

Konfuzitaj de tio ni tuj ĉesis batali kaj ĉirkaŭrigardis. Ĉirkaŭ ni staris homoj amase, kaj iliaj rigardoj promesis al ni nenion bonan.

Sed jen okazis io ankoraŭ pli neatendita. La viro, kiu eniris en nian batalon, okaze vangofrapis knabon, kiu ne estis lia, kaj en la posta momento la patro de la knabo atakis lin.

— Diabla bruto! li kriis. Ĉu vi tiamaniere traktas infanojn de aliaj homoj? Samtempe li komencis karesi la alian per siaj solidaj pugnoj.

Ni ne trovis tempon por percepti, kiel tio okazis, kiam jam preskaŭ ĉiuj viroj same bone kaj fervore luktis kiel ĵus ni. Eble ankaŭ la festo kontribuis al tio. La unua trinkaĵo de la printempofesto jam efikis, kaj la viroj estis en verva humoro.

Kelkaj virinoj ektimis antaŭ tia vidaĵo kaj komencis krii por helpo — afero sensenca, kiam la tuta vira loĝantaro kuŝis kiel kirlaĵo de brakoj kaj kruroj sur la herbo apud nia branĉostako. Aliaj laŭte preĝis, pli kuraĝaj instigis per krioj siajn edzojn, kaj la plej aplombaj atakis.

Ni pli junaj dume retiriĝis kaj silente rigardis la novan batalon. Unue ni sentis kontenton pro tio, ke ni tiel facile, almenaŭ momente, saviĝas de puno. Sed iom post iom ni teruriĝis. La viroj batis unu la alian, kvazaŭ ili dezirus, ke almenaŭ kel-



kaj nepre restu surloke, kaj la tranĉaj krioj de la virinoj kaj la muĝaj bovoblekoj de la viroj plenigis la tutan valon.

Sed jen mi aŭdis malantaŭ mi la voĉon de Emil, malaplomban kaj tremantan:

— Nun mi bruligos, certe estas plej bone . . .

Mi turnis min, sed antaŭ ol mi respondis, li jam bruligis alumeton, kiun li metis al brakpleno da rabotaĵo, kiun ni estis enŝovintaj en la stakon. Leviĝis alta flamo, kaj sekaj juniperoj kraketis kaj ĵetis fajrerojn.

La plenkreskuloj rimarkis tion, nur kiam la tuta flanko de la stako komencis flami. Tiam la virinoj rekonsciiĝis.

— Brulas, ili kriis plengorĝe al la viroj, ĉu vi ne vidas, ke brulas! Atentu, ke la vestoj ne forbrulu!

Ili apenaŭ aŭdis la kriojn, sed ili sentis la fortan varmon. Vole nevole ili retiriĝis kaj ĉesis batali.

Fariĝis strange silente. Kvazaŭ ne komprenante, kial kaj kiel ĝi troviĝas tie, ni rigardis la fajron, kiu kraketis kaj ĉiam kreskis kaj baldaŭ sendis mole flagrantajn flamojn alten ĝis la arbosuproj.

Subite la grandaj turnis sin kaj foriris, sen vortoj kaj gestoj sed kun acidaj mienoj, hejmen al boteloj kaj interrompita manĝo.

Ni restantoj ne sciis, kion entrepreni. Ni rigardis unu la alian, dezirante repaciĝon. Sed kiam niaj rigardoj renkontiĝis, ni tuj forturnis ilin. Ni amare sentis, ke eĉ plena repaciĝo ne povus doni al ni tiun ĝojon, kiu apartenas al la fajrofesto.

Hejmen ni ne volis iri, ĉar tie fariĝus ankoraŭ pli malagrable. Tial ni restis, rigardante jen unu la alian, jen la gaje flamantan fajron, kiu en antaŭaj jaroj donis al ni tiom da ĝojo kaj igis nin forgesi ĉiujn kverelojn.

Pasis unu horo kaj ni la tutan tempon restis silentaj kaj senbruaj kiel neniam antaŭe. La stako jam tre malgrandiĝis.

Jen aŭdiĝis la lamenta voĉo de Emil, plena de ploro kaj kolero:

— Fi, kia printempofajro, fi, fi!

Kun ŝvelintaj lipoj kaj la vizaĝo makulita de fulgo kaj larmoj li abrupte turnis sin, forkuris en kolera galopo kaj malaperis en la mallumo.

Li aspektis mizera kaj ridinda, sed neniu ridis. Ni sentis same kiel li, kaj por kaŝi, ke ankaŭ ni estas ploremaj, ni faris same kiel li: malfiere iris for en la mallumon kaj lasis la fajron por bruli laŭ propra plaĉo.

---

## Mortis Hendrik Adamson

Laŭ informo de Hilda Dresen mortis Hendrik Adamson la 7an de marto 1946. Li naskiĝis 1891. Li estis popollerneja instruisto, sed pro malsanoj li devis rezigni sian oficon. Li estis ankaŭ verkisto en la estona lingvo, poezie kaj proze. Li loĝis izolite en la kamparo, kaj esperanton li lernis sole per memstudoj. De 1932 li komencis verki ankaŭ en esperanto. AELA aperigis 1934 lian rakonton Aŭli kaj poemojn en la volumo Dekdu Poetoj. Poemoj aperis en Literatura Mondo. En la venonta numero de MR esperebla aperos artikolo pri li kaj kelkaj antaŭe ne presitaj poemoj.

---

*Kiuj helpos?* La fondado de MR estis provo krei kulturan revuon en esperanto. La eldonado ankoraŭ restas provo. La deficito estas granda. Se estus duoble pli multe da aĉetantoj, mi ne havus perdon, mi povus mendi pli da manuskriptoj kaj fari la enhavon pli altkvalita kaj varia, povus pligrandigi ĝin aŭ vendi ĝin pli malkare. Se la nunaj ŝatantoj de MR rekomendus ĝin al amikoj kaj tiel havigus novajn aĉetantojn aŭ prefere abonantojn, ni povus atingi tiun staton. Kiu helpos?

*La eldonanto.*

*Korekto.* En nro 1 1946 p. 30, lin. 14 de malsupre: birdoj — burdoj; p. 32, lin. 6: mendio — medio.

---